

# NIA PONTO



Grupo Esperantista de Bilbao  
Barrencalle Barrena, 7-1ª dekstre  
48005-BILBAO (Hispanujo)

Redaktas:

Jesús Miguel García Iturrioz



Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)

☎ 619.694.683 (Iciar)

☎ 658.709.087 (Jesús)

✉ [esperantobi@gmail.com](mailto:esperantobi@gmail.com)

TTT-ejo: <https://sites.google.com/site/esperantobi/home>


En Fejsbuko, serĉu “esperanto grupo bilbao”

**Jar-kotizoj:** Normala: 60 €. Familia: 70 €. Junaĝis 30 jaroj): 20 €.

**KUTXABANK-konto. IBAN-kodo: ES56-2095-0141-4122-1800-1550**

**OKTOBRO/DECEMBRO 2022**

**Nro. 133 (4/22)**



Ĉi-jare **ni denove kunmemoros** la naskiĝtagon de L.L. Zamenhof post du jarojn, kiam tio ne eblis pro pandemio. Ni kalkulas je via ĉeesto. En internaj paĝoj vi trovos sciigon pri la okazigo.

*Después de 2 años en los que no fue posible, éste vamos a conmemorar nuevamente la fecha del nacimiento del creador del Esperanto. Contamos con vuestra asistencia y la de vuestros familiares amigos. En las páginas interiores tenéis más información sobre el evento.*

## **El “día de Zamenhof” en el Grupo Esperantista de Bilbao.**

*Como ya es tradicional, nos reuniremos en el Grupo para celebrar este “día internacional del Esperanto” y aprovecharemos para reunirnos con amigos a los que, por desgracia, sólo vemos por el Grupo en este día.*

*Tras una breve charla, nos juntaremos alrededor de una mesa para dar buena cuenta de la comida y bebidas aportadas por los participantes.*

**Día: Sábado 17 de Diciembre.**

**Hora: 19:00.**

**NE FORGESU!: La 17an de decembro, je 19:00 h., en la E-Grupo de Bilbao, Z-tago.**

## **Prelego en la malnova kvartalo de Bilbao.**

### **ESPERANTO**

Charla sobre la lingua  
internacional neutral.



Prelego: Jenia Garcia Nunez (Secretario del Grupo Esperantista de Bilbao)  
LUGAR: MALATESTA, Calle Somera, 10  
48001 VIGO (Ourense)  
Día: 9 de noviembre a las 19:00 horas

La 9an de novembro, invititaj de la sindikato CNT, oni organizis prelegon pri Esperanto ĉe la drinkejo “Malatesta”, kiu lokiĝas en strato Somera, ene de la malnova parto de Bilbao.

Bedaŭrinde la afero ne interesigis neesperantistojn ĉar ĝin ĉeestis nur du membroj de nia E-Grupo.

Sed ni ne malesperiĝas kaj jam planas la okazigon de novaj prelegoj.

## **Cuotas del año 2022 / Kotizoj 2022.**

*Si a la izquierda de estas líneas aparece una “X”, es que **te has olvidado de hacer el pago de la cuota de socio de este año.** El número de cuenta donde hacer el ingreso, así como las cuotas vigentes, están en la primera página de este “Nia Ponto”.*

Se maldekstre de tiuj ĉi alineoj ni skribis ruĝan “X”, tio signifas, ke **vi forgesis paĝi vian kotizon por la nuna jaro.** Kontonumeron, kien enkontigi la monon, kaj nunajn kotizojn vi trovos sur la frontopaĝo de tiu ĉi “Nia Ponto”.

## **Ĉu vi volas scii, kiu estas via nivelo de Esperanto?**

Se jes, faru la sekvantan retan ekzamenon:

[https://portal.uned.es/GestionGuiasCuid/pruebadenivel/esperanto/prueba\\_nivel\\_b1.htm](https://portal.uned.es/GestionGuiasCuid/pruebadenivel/esperanto/prueba_nivel_b1.htm)

(Esperanta Grupo de Bilbao. 04/11/2022)

**LOKE ...**

## KRISTNASKA LOTERIO.



Ni daŭrigas la disvendadon de la tradicia kristnaska loterio. La ĉi-jara numero estas **33.274**.

**Ĉiu bileto kostas 5 €** el kiuj oni lotludas 4 € kaj restas 1 € kiel donaco al la Grupo.

**La lasta tago por aĉeti la biletojn estas la sabato 17a de decembro. Oni rezervas biletojn al neniu.**

### **Kaj memoru ke, kiel kutime, ankaŭ eblas aĉeti loterion per interreto:**

Por tio sekvu la jenajn paŝojn:

1. Enkontigu la monon en la konto de la Grupo Esperantista de Bilbao. IBAN-kodo: **ES56-2095-0141-4122-1800-1550**.
2. Sendu retmesaĝon al **esperantobi@gmail.com** informante pri la monenkontigo.
3. Ni sendos la skanitajn biletojn per repaŝto. La originaloj restos en la E-Grupo de Bilbao.
4. Se la biletoj estus premiitaj, ni rekte sendus la monon al la bankkonto indikita de la aĉetinto, tute senpage por li aŭ ŝi.
5. Tiu, kiu volus ricevi la originalajn biletojn post la lotado, bv. sendi retmesaĝon al **esperantobi@gmail.com** kaj ni sendos ilin per normala poŝto al la adreso indikita de la aĉetinto.

### **Como de costumbre, también se puede comprar la lotería de Navidad por internet. Último día para comprar: sábado 17 de diciembre. No se reserva.**



Para ello:

1. Hay que ingresar el dinero en la cuenta del Grupo Esperantista de Bilbao. IBAN: **ES56-2095-0141-4122-1800-1550**. **Cada billete cuesta 5 €** de los que se juegan 4 €, quedando 1 € como donativo para el Grupo.

2. Hay que enviar un e-mail a **esperantobi@gmail.com** dando cuenta del ingreso.

3. Enviaremos los billetes, escaneados, por e-mail. Los originales quedarán depositados en el Grupo de Bilbao.
4. Si los billetes resultan premiados, enviaremos el dinero, directamente, a la cuenta indicada por el comprador, sin gasto alguno para éste.
5. Quien quiera recibir los billetes originales, una vez realizado el sorteo, debe enviar un e-mail a **esperantobi@gmail.com** y se los enviaremos, por correo ordinario, a la dirección que se nos indique.

## Ĉesas la peranto de UEA en Hispanio.

Laŭ peto de Pedro A. Garrote, mi informas ke li ne plu povas daŭrigi sian funkcion kiel peranto de UEA kaj de diversaj revuoj, ĉar lia sanstato malhelpas tion. Do, bonvolvo ne plu sendi pagojn en lian konton.

Jen priskribo de tiu funkcio: Peranto akceptas membroklotizojn por UEA. Ŝi/li krome akceptas aliĝojn kaj mendojn por la universalaj kongresoj kaj abonojn por la revuoj Esperanto kaj Kontakto. Ŝi/li peras ankaŭ donacojn al la Fondaĵoj de UEA. Estus bone, se nova peranto:

- estas administre lerta;
- scias kiel transpigi monon al Nederlando;
- scias ion pri merkato kaj sukcesas stimuli la homojn membriĝi en UEA;
- helpas per varbado de novaj membroj;

Se vi, leganto, ŝatus surprizi tiun funkcion, turnu vin al la estraro de UEA: [direktoro@co.uea.org](mailto:direktoro@co.uea.org)

Al kara Pedro mi sincere dankas pro la bonaj servoj faritaj dum multaj jaroj al la hispanaj esperantistoj.

*(M. Parra, HEF-Sekretario. 18/10/2022)*

## OFICIALA KURSO DE ESPERANTO EN MEZLERNEJO.

Ankaŭ en mezlernejo eblas lerni Esperanton. La gimnazio (IES) Almenara en la urbo Vélez-Málaga (proksima al Malago, en Andaluzio) proponas denove oficialan kurson pri Esperanto kaj Eŭropaj valoroj, danke al projekto "Esperanto komunikoj" kadre de la eŭropa programo Erasmus+. Ĝin kunordigas nia kolego Fabián Jiménez.

Ĝi estas la sola hispana publika mezlernejo kie oni povas studi Esperanton kiel elekteblan lernofakon. En tiu ĉi jaro 29 lernantoj studos Esperanton en la 1a bakalaŭra kurso (estis preskaŭ 40 petoj por elekti tiun ĉi fakon sed kaŭze de organizproblemoj nur 29 povis fine studi ĝin). Ĝi estos la dua fojo kiam oni instruos Esperanton oficiale; la unua fojo estis dum la kurso 2019-20 kiu bedaŭrinde ne povis esti tute plenumita pro la pandemia enfermiĝo.

*(“La Bitbulteno” de HEF. Nro. 84. Nov. 2022)*

## KUNSIDO DE LA LKK DE LA HISPANA KONGRESO EN SEVILO.



La 1an de oktobro okazis kunveno kun la LKK, kiu preparas la venontan Hispanan Kongreson okazonta en Sevilo de la 12a ĝis la 15a de oktobro 2023. La grupo (vidu foton en la hispanligva parto) arde laboras por trovi la plej taŭgan kongresejon kaj oni prezentis kelkajn eblecojn por elekti. Oni ankaŭ parolis pri programo kaj pri antaŭ- kaj postkongreso. Mankas nur kelkaj detaloj por finpretigi la paĝaron de la kongreso, kiu espereble baldaŭ funkcios.

*(“La Bitbulteno” de HEF. Nro. 84. Nov. 2022)*

# INTERNACIA KONGRESO DE INTERKULTURA KOMUNIKADO - IKIKO 2022.



Inter la 8a kaj 12a de novembro disvolviĝos nova eldono de IKIKO, post la spertoj en 2020 kaj 2021.

IKIKO estas la Esperanta akronimo de “Internacia Kongreso pri Interkultura Komunikado”. Tio estas kongreso, en kiu ĉiu ajn, sendepende de sia akademika kaj ekonomia statuso kaj lingvo, povas partopreni per kontribuo de materialo rilata al interkultura komunikado.

IKIKO celas esti pli ol nur kongreso, ĝi estas plurdimensia. Unuflanke temas pri scienca sperto, kiu sendas artikolojn al scienca revuo. Aliflanke ĝi estas renkontiĝo de homoj kaj komunumoj. La temo de

IKIKO estas interkultura komunikado el larĝa vidpunkto. IKIKO estas plurlingva: unu el ĝiaj celoj estas plifortigi la gepatrajn lingvojn, elektitajn de la sidejoj kaj ĝi ankaŭ estas multloka, ĝi realiĝas per la partopreno de aŭtonomaj ejoj el diversaj partoj de la mondo.

Oni povas pliampleksigi la informojn kaj enskribi ĝi ĉe: <https://ikiko.civiciencia.io/eo>.

(“La Bitulteno” de HEF. Nro. 84. Nov. 2022)

## Surprizo: Marisol kaj Esperanto.



En la programo “Cine de Barrio” de la hispana televido TV1 eblis spekti la filmon “Búsqumene a esa chica” (“Trovu al mi tiun knabinon”), kie aktorino Marisol, kiu antaŭe estis infanaktorino, impresario devigas ŝin edukiĝi kaj interalie ŝi devas barakti por eklerni francajn kaj anglajn vortojn: post evidenta malsukceso, ŝi proponas: **Ĉu ne pli bone lerni tion en Esperanto?**

Se vi deziras spekti la precizan parton de la filmo, kie tio aperas, bv. iri al HEF-jutubejo.

(El Interreto. 27/11/2022)

## Apero de interesa libro.

En junio 2021, la historiisto Jacinto M. Arévalo Molina, fakulo pri temoj rilataj al la Hispana Enlanda Milito, sin turnis al HEF petante kunlaboron por de li preparata granda libro pri poemoj pri la Internaciaj Brigadoj originale verkitaj en diversaj lingvoj, inter ili Esperanto. Ĉi lastajn li elektis el la jam preskaŭ mita gazeto *Popola Fronto*, ĉefredaktorita de la valencia laboristo-esperantisto Luis Hernández Lahuerta de 1936 ĝis 1939, kaj li deziras elesperantigon en la hispanan por publikigi tiujn poemojn dulingve (hispane-Esperante) kuntekste de sia libro.

HEF komisiis al mi tiun taskon, kiun mi plej volonte akceptis kiel veran honoron. Temas pri dekkvaro da poemoj el gravaj tiutempaj Esperantaj poetoj kaj aktivuloj, inter ili Julio Mangada, Eŭgeno Miĥalski, Konstanteno Gusev, N. Babaskerof, A. Persson ktp.

(M. F. 12/11/2022)

## TRA LA MONDO ...

### Zamenhof kaj Madrido.

Ĉu vi sciis, kion diris Zamenhof pri Madrid en la Unua Libro? Jen kelkaj faktoj kaj pensoj pri la Unua Libro.

<https://bibliotekoj.org/esperantajbitoj/pongamos-que-hablo-de-madrid.html>

(Javier G. 26/10/2022)

### Virtuala kongreso de UEA.




De la 24a ĝis la 27a de novembro UEA okazigis la 3an virtualan kongreson. Laŭ informas UEA mem, “Se tiu ĉi modelo sukcesos, ĝi eventuale fariĝos konstanta aranĝo, suplemente al la UK”. Alia novaĵo estas, ke ĝi okazis samtempe kun Retoso 2022, la reta evento de TEJO.

La 3-a VK havis kiel temon la saman temon de la 107-a Universala Kongreso, okazinta en Montrealo: "Lingvo, vivo, tero: Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj". Unu el la celoj nun okazigi la VK-n pli proksime de la fino de la jaro estas elstare doni al la temo de la UK pluan traktadon dum la jaro. Do la 3-a VK devos havi specialan atenton al indiĝenaj lingvoj, kun prelegoj kaj kursetoj.

Samtempe la VK utilis kiel retrospektivo de la jaro, kun rememorigoj pri diversaj gravaj okazoj. En 2022 i.a. estis la 135-jariĝo de Hector Hodler, la 125-jariĝo (samtempe 85-jariĝo de la morto) de Eŭgeno Miĥalski, la 100-jariĝo de Eli Urbanová (samtempe 10-jariĝo de ŝia forpaso), la 100-jariĝo de Rejna de Jong, la 100-jariĝo de la Esperanto-radiofonio, la 80-jariĝo de la morto de Lidja Zamenhof, la 70-jariĝo de la Centro por Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) k.a. Aldone al tiuj rememoroj estis ankaŭ riĉa scienca, faka kaj kultura programo, kun spaco por eldonistoj, aŭtoroj kaj artistoj.

Krom rigardo al la pasanta jaro, la VK ankaŭ estis vitrino por novaĵoj: oni prezentis laborprogresojn pri la 108-a UK en Torino kaj ĝiaj diversaj programeroj: i.a. pri Belartaj Konkursoj, Esperantologia Konferenco, scienca programo ktp. Klasike estis la virtuala Movada Foiro (spaco por landaj kaj fakaj asocioj kaj aliaj temgrupoj) kaj prezento de agado de la komisionoj de UEA.

### Alternativa Eŭrovida konkurso (“Eurovision”).



Esperanto estis akceptata en tiu alternativa konkurso, ĝemela de la mondfama “Eurovision” (oficiala nomo en la angla). Itala kantistino Kjara (Chiara Raggi) prezentis la kanton “Mozaiko” kaj sukcesis atingi la konkursofinalon: Kjara ĉirkaŭ 80% kontraŭ 3% la aliaj.

### Elon Musk pelas esperantistojn el Twitter.



La miliardulo Elon Musk aĉetis la socian retejon Twitter, kaj tuj diskonigis grandajn ŝanĝojn. En kombino kun liaj propraj strangaj afiŝoj en la retejo, tio konvinkis multajn uzantojn de Twitter ekserĉi alternativojn. La plej populara ŝajnas esti la servo Mastodon, kien alvenis ankaŭ novaj esperantistoj.

La sorto de Twitter zorgigas multajn uzantojn de la servo ekde aprilo 2022, kiam la plej riĉa homo de la mondo, la entreprenisto Elon Musk, promesis pagi por ĝi 44 miliardojn da usonaj dolaroj. Li tiam anoncis, ke li volas transpreni la servon por konservi ĝin kiel ejon por libera sinesprimado, sed ne estas klare, kion li celis per tio. La multilate kaprica konduto de Elon Musk kaj liaj ofte nepripensitaj elpaŝoj kaŭzis suspektojn, ke lia difino de "libera sinesprimado" povas estigi diversspecajn problemojn.

La interkonsentita, altega prezo baldaŭ montriĝis troa kompare kun la merkata valoro de la kompanio Twitter, kaj baldaŭ Elon Musk anoncis, ke li tamen ne aĉetos Twitter. Li asertis, ke li ricevis de Twitter falsajn informojn interalie pri la kvanto de tiel nomataj falsaj kontoj en la servo, kaj ke tial li ne estas ligita de la interkonsento.

La akciuoj de Twitter ne volis rezigni pri la profita negoco, kaj minacis Elon Musk per longa kaj kosta proceso, se li ne plenumos siajn sindevigojn. Fine de oktobro li fine akceptis pagi la konsentitan prezon kaj iĝis la sola posedanto de la kompanio, kies akcioj ĝis nun estis malferme vendataj en la Novjorka borso. Twitter estos forigita el la borso la 8-an de novembro, kio donos al Elon Musk liberajn manojn regi ĝin.

Tuj post la aĉeto, Elon Musk anoncis pri planataj grandaj reduktioj en la personaro de Twitter. La ĝenerala direktoro kaj la direktoro pri moderado perdis siajn postenojn, dum Elon Musk mem provizore transprenis la direktoran postenon. La nestabila situacio igis multajn uzantojn de Twitter ekserĉi alternativojn. Plej populara inter tiuj montriĝis Mastodon, kiu multilate similas al Twitter, sed ne estas komerca kaj ne povas esti posedata aŭ regata de iu ajn unuopulo, ĉar ĝi funkcias kiel reto de diversaj, aŭtonomaj serviloj, kiuj starigas siajn proprajn regulojn.

Inter la aŭtonomaj serviloj ekzistas ankaŭ relative populara esperantlingva Mastodon-ejo, [esperanto.masto.host](https://esperanto.masto.host). Ĝi nun havas proksimume 750 uzantojn, el kiuj pli ol cent estas aktivaj, laŭ la prizorganto, Philippe Lemaire. Li jam rimarkis, ke en la lastaj tagoj aperis pluraj novaj uzantoj, ŝajne pro la problemoj ĉirkaŭ Twitter:

*(Libera Folio. 01/11/2022)*

### Esperanto sur la oficiala pilko de futbala mondopokalo.



Sur la oficiala pilko de la futbala mondopokalo legeblas vortoj en Esperanto:

FUTBALO ESTAS KOLEKTIVA RESPONDECO  
PASIO RESPEKTO TEAMLABORO. HONESTECO

*(L. N. 23/11/2022)*

# GRAMATIKAĴOJ

## Pli kaj plu.

La diferenco inter “pli” kaj “plu” estas tio, ke “pli” montras pli altan gradon kaj “plu” indikas daŭron:

“Mi ne deziras pli (multe) da kafo” signifas, ke mi estas kontenta pri tio, kion mi jam ricevis.

“Mi ne deziras plu kafon”: Antaŭe mi deziris, sed nun mi ne plu deziras.

“La aeroplano leviĝis pli alten” (ol ĝi antaŭe estis).

“La aeroplano leviĝis plu supren” (daŭrigis la supreniĝadon).

“Plu” estas uzata ankaŭ kun la finaĵo “-e”: “Ni iru plue!”

Necesokaze, kiam oni volas speciale akcenti direkton, oni uzas ĝin ankaŭ akuzative:

“Li iris kelkajn paŝojn plueN”.

Sed ankaŭ en tia okazo sufiĉas plej ofte la simpla “plue”, same kiel ankaŭ ĉe “returne” la akuzativo estas kutime superflua: “ĉe la stratangulo li rigardis returne”.

Kelkfoje oni kunmetas “plu” kun verbo: “Post mallonga halto ni pluiris” (aŭ iris plu, iris plue).

(SEPIIK, Henrik. - “La tuta Esperanto”)

## E-kongresoj 2023.



- 96-a SAT-kongreso. Kastelo Grezyljono (Francio). 18/25 julio.
- 40-a Pola E-Kongreso. Siedlce, 96 km oriente de Varsovio. 20/23 julio.
- 108-a Universala Kongreso. Torino (Italujo). 29 jul./05 aŭg.
- 79-a Internacia Junulara Kongreso (IJK). Marina di Massa (Italujo)
- 81-a Hispana Kongreso. Sevilo/Sevilla. 12/15 oktobro (Dato ankoraŭ necerta)

**FELIĈAN NOVAN JARON NI DEZIRAS AL VI ĈIUJ!**